# Informilo

Monata revuo de F L A N D R A  E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E  E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto / Jaargang N° 1 majo / mei 1981

27 MEI 1981

Verantwoordelijke / Respondecas Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

---

Kara Leganto,

X Jen io nova : novaĵbulteno por la kadromembroj de FEL.

Ĝi aperos ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.

Kial nova bulteno ?

Tutunue por ŝpari monon ! Dissendante niajn informojn, protokolojn, komunikojn k.c. en formo de revuo, ni ŝparos 5/6 - ofte eĉ pli - de la afranko-kostoj.

Aliflanke, INFORMILO povos esti, verŝajne ankaŭ estos, unua paŝo al la jam de tiel longe sopirata propra revuo de FEL.

Malgraŭ sia ankoraŭ humila aspekto, INFORMILO malfermos la vojon al pli bonaj kontaktoj, pli bona kaj regula informado, pli bona komuna agado; ĝi estos plie "diskutilo" inter la estraro kaj la kadromembroj.

Do, ekde nun vi povos komuniki viajn ideojn, sugestojn ktp pere de INFORMILO. Sufiĉas sendi ilin al la redaktoro.

Ni esperos ke tiu ĉi nia iniciato renkontos vian aprobon kaj kun antaŭĝojo atendas viajn kontribuaĵojn.

J.B.

P R O T O K O L O

pri la estrar-kunsido de sabato 9-a de majo 1981 en Gento.

Ĉeestas : S-roj E. SYMOENS, R. DE SCHEPPER, P. PEERAERTS, R. BUDTS,
G. SCHROEYERS, J. BOVENDEERD

Petis senkulpigon : F. ROOSE (eksterlande), K. TYTGAT (dejoro) kaj
J. VERSTRAETEN (kunsido de Int. Hodler '68)

Prezidas : E. SYMOENS
Protokolas : J. BOVENDEERD

Komenciĝo : 10.15 h.

1. Pri la protokolo pri la estrarkunsido de 11 04 81 jenon :

1.1. - al. 2.1.4.2. : aldoniĝu "laŭ difinita laborplano".

1.2. - al. 2.6.4.2. : legu : ".. du Orient-Eŭropajn, unu Okcidentan kaj unu Orientan ... "

1.3. - al. 2.6.4.3. : legu : ".. traduko "kaj, anstataŭ " La Instituto petas.." : " La aŭtoro petas ..."

1.4. - en la ORGANIGRAMO korektu :

KALMTHOUT : prezidanto : Wim DE SMET, Hertendreef 12
2180 KALMTHOUT 031/66 99 49

KORTRIJK : Sekretario : Jan HANSSENS, Meiweg 17 (niet HELMweg)
8500 KORTRIJK 056/21 31.06

Kasisto : Cesar VANBIERVLIET

Plie la protokolo estas aprobita.

2. Raportado de la estraranoj

2.1. Administrado (J.B.)

2.1.1. Por plimalaltigi la afranko-kostoj, J.B. proponas venonte dissendi la protokolojn en formo de monata revuo. Tiel ni ŝparus 5/6, ofte eĉ pli de la afrankoj.
Aprobite.

2.1.2. Tio povus esti la unua paŝo al propra revuo.



2.1.3. Kiel titolo elektiĝas : " I N F O R M I L O "

2.1.4. La estraranoj profitos de la revuo por klarigi certajn punktojn de la protokoloj, propagandi decidojn ktp.

2.1.5. La revuo same povos servi kiel respondilo al demandoj k.s.

2.1.6. P.P. zorgos por la necesaj kovertoj.

2.1.7. R.D.S. proponas - alirilate -, ke P.P. venonte ankaŭ komuniku al la sekretario sian kalendaron rilate al eksteroficejaj dejoroj.
P.P. aprobas.

2.2. Edukado (J.B.)

2.2.1.Kadrokursoj.

2.2.1.1. Ĉar certaj personoj, kiuj volas partopreni la kadrokursojn, sed ne povis ĉeesti la ekzamenon, plia ekzamenebleco estos kreita la kursotagojn mem, unu horo antaŭ la komenca horo.

2.2.1.2. Ĉar estas aliaj personoj, kiuj jes partoprenis la ekzamenon, sed ne povos partopreni ĉiujn kursotagojn, J.B. proponas organizi duan kurso-serion komence de 1982.

2.2.1.3. Pri la broŝuro ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO, la dua malneto finpretiĝis.
J.B. sin demandas, ĉu tiu ĉi dua teksto denove estu dissendita al ĉiuj kiuj ricevis ĝin la unuan fojon aŭ ĉu nur al tiuj kiuj respondis.
Nur al la respondintoj, opinias la ceteraj estraranoj.

2.3. Financoj

2.3.1. J.V. malĉeestas. Tial R.D.S. kaj P.P. raportas.

2.3.1.1. Ekzistas malgranda deficito. Diversaj ŝuldantoj ne pagas regule en konvena tempo. Tial FEL ne povas pagi siajn proprajn ŝuldojn.

2.3.1.2. Ĉar la kreditoroj de FEL alkalkulas rentojn pro malfrua pago, ekestas en nia kaso deficitan renton. Tial P.P. proponas same alkalkuli renton al malfrue pagantoj, por tiel eviti tiun negativan rezulton.
Aprobite.

2.3.1.3. La afero en si mem ne estas "malsana", sed la malfacilaĵoj ĉefe kuŝas en la moninterŝanĝo.

2.3.2. Librotenado (P.P.)

2.3.2.1. Kiel solvi la malgajnon ?

2.3.2.2. La unua malgajno parte trovas sian kaŭzon en la fakto, ke ekde 1981 la librotenado estas prizorgata de salajrata oficisto, tie kie ĝi antaŭe estis farita de J.V. Ĝi postulas meze unu horon tage.

2.3.2.3. Solvo ankoraŭ ne prezentiĝis.
La esplorado pludaŭras.

2.3.3. Financ-planado (R.D.S)

2.3.3.1. R.D.S. ellaboris la regularon de "FIKSDATAJ MONDEPONOJ" surbaze de la regularo tiurilata de UEA.

## REGULARO PRI FIKSDATAJ MONDEPONOJ

1. FEL akceptas de siaj membroj fiksdatajn deponojn por minimume po du jaroj: la enpagoj, transpagoj kaj elpagoj de la deponitaj sumoj estas notitaj en personaj kontoj ĉe la Esperanto-Centro. Nur la kvitancoj pri tiuj sumoj kaj la kontoj de la ligo estas pruviloj por la deponoj.

2. La minimuma deponebla sumo estas fiksita je 5000 frankoj. Depono povas okazi al la poŝtĉekkonto de FEL (N-ro 000-0265338-43), al ĝia bankkonto (n-ro 402-7069801-50) aŭ rekte en la sidejo de FEL. Se la depono okazas pere de banko aŭ poŝtĉekkonto al la konto de FEL, la pruvilo de la banko aŭ de la poŝtkonto validas kiel kvitanco: se la depono okazas en la Esperanto-Centro mem, per transpago aŭ spezoj, la kvitanco por la depono validas nur, se ĝi estas subskribita de la Direktoro aŭ la Estrarano pri Financoj de FEL.

3. Deponfino okazas nur post averto ricevita en la Esperanto-Centro antaŭ la fino de periodo de du jaroj. Sen averto flanke de la deponinto, la depono aŭtomate pludaŭras por plia periodo de du jaroj.

4. Elpagoj post deponfino okazas tuj por maksimumo de 20 000 frankoj. Se depono estas pli alta ol 20 000 frankoj, la plia sumo estas elpagebla per partoj de maksimume po 20 000 frankoj en ĉiu monato. Tiu regulo ne validas por transpagoj al FEL mem.

5. La rento estas fiksita je 6% kaj ĝi restas senŝanĝa, ĝis aperas publika avizo en la revuo *Esperanto-Panorama*. Ĝi estas ĉiam elkalkulita por unu tuta periodo de unu jaro, ekde la unua tago de la monato sekvanta post tiu de la depono.

6. La rento estas pagata post ĉiu periodo de unu tuta jaro. Plenumo de elpagopeto de la depono aŭ de parto de la depono antaŭ la deponfino, aŭtomate kaŭzas la nuligon de la rento por tiu kuranta jaro rilate al la sumo elpagita. Je apliko de § 4 tamen, la rento estas elkalkulata por ĉiu monato post la minimuma deponperiodo kaj aldone pagenda.

7. La elkalkulata rento aldoniĝas al la depono. La deponinto rajtas je elpago de la jara rento, se li aŭ ŝi tion petas.



2.3.3.2. R.D.S. ankaŭ prizorgis la subvencipeton al INSTIUTCIO HODLER'68. Ĝi estas hodiaŭ defendata de J.V. en la kunsido de I. HODLER

2.4. Informado - Planado - Agado (E.S.)

2.4.1. E.S. kaj S-ro Senatano PIOT vizitis la kabinetĉefon de la Ministerio pri Komunikado, cele al la akiro de speciala poŝtmarko por la UK en 1982. Ili atendas respondon.

2.4.2. Ankaŭ la Ministerion pri Nederlanda Kulturo ili vizitis cele al plibonigo de la subvenciado de niaj aktivecoj.

2.4.3. La letero destinita al la diferencaj instancoj pri "Migrad-laboro en Flandrio" estas aprobita. Pri la dissendado decidiĝas atendi ankoraŭ iom da tempo.

2.4.3.1. E.S. ricevis leteron kaj dokomentan dosieron de "L'ORGANISATION DU PEUPLE EUROPEEN" kiu konfirmas, ke Esperanto estas akceptita de OPE kiel komuna lingvo apud la franca kaj la angla.
OPE ankaŭ proponas al FEL respondecon de delegito en OPE kaj prikonsideras partoprenon en la UK en 1982.

2.4.3.2. E.S. petos 10-on da ekzempleroj de la dosiero, por povi taŭge ĝin pritrakti en venonta kunsido.

2.4.4. La broŝuro "PEDAGOGIA VALORO DE ESPERANTO" estas preta.

2.5. Kontaktoj kun la grupoj (G.S.)

2.5.1. Sabaton 16-an de majo okazos en Hasselt ĝenerala provinca kunsido de la Limburgaj esperantistoj kaj simpatiantoj.

2.6. Kulturo (F.R.)

2.6.1. Perletere F.R. proponas havigi al la grupoj kopion de sia artikolo "KULTURPOLITIKO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO".

Ĝi estos aldonita al ĉi tiu protokolo.

2.6.2. F.R. same proponas, ke la grupoj raportu pri sia agado 1980/1981.

Pri tio, ni atendu ..

4. Atestoj/Diplomoj. (J.B. k. P.P.)

4.1.Luksaj diplomoj fakte ne estas pageblaj.

4.2. Kontraŭe, komputeraj atestiloj kostas praktike nenion.

4.3. Ĉar temas pri eksperimento, ni kontentiĝu pri komputeraj atestiloj.

5. Memorletero por ne-repagintoj (JB)
La projekto proponita de JB estas korektita. Tamen ĝia dissendo estas prokrastita ĝis venonta jaro.

6. Diversaĵoj

6.1. Manlibro de Varbado Nr. 3 de Günter Conrad aperos baldaŭ. SONORILO mendos kvanton.

Fino : 12.45 h.

---

P R O T K O L O

pri la ĝenerala provinca kunsido Orient-Flandra de sabato 9-a de majo 1981 en Gento.

Sin prezentis nur 6 personoj : Ges-roj Lödör, Ges-roj Van de Velde kaj S-ro Pap Bela el Gento, kaj S-ro H. Audenaert el Lokeren.

Petis senkulpigon : S-ino Waeterinckx el Aalst.

Prezidas : E. Symoens
Protokolas : J. Bovendeerd
Komenciĝo : 14.15 h.

1.1. La prezidanto eksplikas, ke la intenco de la ĝeneralaj provincaj kunsidoj estas organizi FEL, konsiderante la lokajn bezonojn/dezirojn laŭ province. Kiom ajn bonvola la estraro ankaŭ povas esti, necesas koni la sintenon de la membroj kaj de lokaj grupoj por bone organizi la estraran laboron.

1.2. Tial ŝajnas necese, ĉar la estraro ne povas esti ĉie samtempe, disponi pri almenaŭ unu provinca kontaktpersono, kiu povas resti en kontakto kun la grupoj kaj reprezenti kaj defendi ilin ĉe la estraro.

2.1. S-ino Lödör konstatas, ke fakte nur malgranda kerno aktivas kaj ke tiu kerno iom post iom maljuniĝas.

2.2. Ĉe la junuloj estas malmulte da aktiveco.

2.3. Tiuj personoj, kiuj aktivas, jam havas sufiĉe da taskoj kaj ne povas alpreni pliajn.



3.1. S-ro Van de Velde aprobas la laboron de la estraro kaj ne vidas kiel pliboniĝi ĝin.

3.2. Li demandas el kio konsistas la laboro de provinca kontaktpersono.

3.3. La prezidanto vidas en tio personon kies tasko estas organizi la movadon regione.

3.4. La sekretario opinias, ke la unua paŝo estu serĉi kontakton kun la grupoj kaj reprezentantoj, konsili al ili kaj defendi iliajn interesojn ĉe la estraro.

3.5. Provinca kontaktpersono havas plenan rajton partopreni la estrarajn kunsidojn kaj interveni se necese favore al la grupoj kiujn li reprezentas.

3.6. Iom post iom li devus klopodi trovi kiom eble plej da lokaj reprezentantoj kaj fondi kernojn ĉirkaŭ ili.

3.7. La fina celo de la kampanjo lanĉita antaŭ iom pli ol unu jaro estas akiri minimume 80 diversajn kernojn pli bone organizitajn ol tiuj de antaŭ la milito.

3.8. En tio cetere ankaŭ kadras la ĵus organizitaj kadrokursoj : formi taŭgajn elementojn por gvidi grupojn, gvidi kursojn, fari propagandon.

4.1. S-ro Audenaert sin demandas ĉu propagandi en publikaj ejoj, ekzemple en atendejoj de kuracistoj, dentistoj, frizistoj ktp., povus esti interesa.

4.2. Laŭ spertoj en la Antverpena regiono, tio donas nenianrezulton.

5.1. S-ro Lödör opinias, ke ekspozicioj estas necesaj, sed ke la materialo malaktualiĝas. Kiel solvi tion ?

5.2. Atentigita estas li, ke ekzistas speciala servo por ekspozicimaterialo kaj ke sufiĉas kontakti la Esperanto-Centron en Antverpeno. Tio cetere estas retrovebla en unu el la antaŭaj estraraj raportoj. (14.11.1980 k. 13.12.1980)

6.1. S-ro Audenaert estas preta krei kernon en Lokeren.

6.2. Por helpi al li, la sekretario disponigos leterojn ktp. Sufiĉas sciigi al li daton kaj lokon de la unua kunveno, kaj la resto estos prizorgita helpe de la sekretario.

7.1. S-ino Lödör atentigas ke en Dendermonde devas esti multe da bonaj elementoj.

7.2. Oficiale en Dendermonde nenio ekzistas. Al la estraro neniu iam ion sciigis.

7.3. Cetere, eĉ tiuj personoj kiuj sin anoncis kiel reprezentantoj de FEL ne repagis sian kotizon !

7.4. Normale ni eĉ ne povus akcepti ilin kiel reprezentantojn.

7.5. La prezidanto konstatas kun bedaŭro, ke certaj personoj, kiuj eble tre bone laboras individue, ŝajne ne komprenas la gravecon de organizita agado.

8.1. Ĉu inter la ĉeestantoj estas iu, kiu pretas esti provinca reprezenanto?

8.2. Neniu, sed S-ino Lödör estas preta enketi. Ŝi sciigos la nomon kaj adreson de tiu persono kiun ŝi trovos.

9.1. Antaŭ ol fini, la sekretario demandas, ĉu estas intereso por kongresoj kaj se jes kiaj, ĉu flandraj, ĉu belgaj.

9.2. Kelkaj pledas por tutlandaj,belgaj do, dum aliaj trovas ke la tiamaj flandraj kongresoj estis multe pli allogaj, sukcesaj kaj amuzaj ol la postaj tutlandaj.

9.2. S-ro Lödör vidas avantaĝojn en tutlandaj kongresoj, pro renkontiĝeblecoj kun alilingvanoj en propra lando.

9.3. Tamen, kongresoj devus esti por krei la eblecon por la gemembroj sin renkonti.

9.4. Konsidere al la ŝanĝiĝanta socia vivo, la kongresformulo devus ŝanĝiĝi : la administraciaj partoj devus esti forigitaj kaj anstataŭigitaj de pli allogaj programeroj.

10.1. Por fini kaj je peto de la prezidanto, J.B. ankoraŭ foje eksplikas la celon kaj funkciadon de la kadrokursoj.

Fino : 16.15 h. J.B.

----------



Kulturpolitiko de Flandra Esperanto-Ligo.

Ĉe la bazo de la ideo pri internacia lingvo estis en la penso de Zamenhof la (mond)paco. Kiu povus dubi, legu i.a. lian paroladon dum la 2-a universala kongreso en Genève (1906). Tio implicas la ideon ke la diversaj popolo interkontaktu, interkonatiĝu kaj sekve interamikiĝu. Ek de sia ekzisto la Flandra Ligo Esperantista konsekvence iris tiun vojon. En preskaŭ ĉiu numero de "Flandra Esperantisto" oni povis legi ion pri alia popolo kaj ion pri la nia propra: poemo, prozaĵo, kanto, artikolo pri historio aŭ io ajn alia (kultura) manifestacio. En nia kazo tio signifas ke ni devas konatigi la Flandran (t.e. la Sud-Nederlandan) kulturon kaj ekkoni la fremdajn kulturoj. Bedaŭrinde, ni ne plu disponas pri propra revuo por fari tion (*)
Se ni volas verki originale aŭ traduki, ni devas sendi al alia specife kultura revuo. Aliflanke ĉu estas nunmomente gesamideanoj kiuj pretas kaj kapablas verki en tiu senco ? Kiuj estas la posteuloj de Karnas, Van Schoor Vermuyten ?

Inter krampoj, retas nepublikigitaj ĉirkaŭ triono de la Mezepoka legendo de Beatrico kaj sama kvanto de Renardo la Vulpo - ambaŭ tradukitaj de H. Vermuyten.

Sed nia kulturpolitiko povas ankaŭ moviĝi sur alia tereno, tiu de la internacia kultura agado. Niaj grupoj estu centroj de Esperanto-kulturaj aktivaj. Se en grupo oni unuavice devas praktiki la lingvon, oni faru ĝin per interesa programo, kelkfoje kulture (alt)nivela. Tial ni faras kelkajn sugestojn.

1° Vesperoj kun parolado. Ni havas en la ligo plurajn specialistojn. Ivo Durwael faris liston kaj nun reordigas alian.

2° Vesperoj en kiuj oni laŭtlegas kaj komentarias poemojn, prozojn, artikol. Tial estas necese ke ĉiu grupo abonu kelkajn revuojn, ekz. "Monato", "Kulturaj Kajeroj" de Kastelo Gresillon, "Monda Karuselo" eldonita en Skotlando, la nova literatura revuo sub redaktado de W. Auld. Ĉiuj estas haveblaj ĉe "SONORILO".

3° Tradukvesperoj. Tie ĉi la grupo de Turnhout montras la bonan ekzemplon.

4° Okazas ne malofte ke fremda esperantisto - ĉu literaturisto, kantist(in)o, dramist(in)o vizitas nian landon kaj pretas prezenti en lokaj grupoj. Oni kaptu tiun eblecon. Foje oni povas organizi kun alia kultura grupo. Olivier Tzaut meri-tas esti aŭskultata de ĉiuj.

5° La grupanoj interkonsentu por kune viziti iun ekspozicion, teatraĵon, muzikaĵon. En la posta grupa kunveno oni raportu. Ĝi havas la kroman avantaĝon ke tiaj kunaj vizitoj plifortigas internajn amikajn rilatojn.

-----------

(*) Tiu ĉi artikolo redaktiĝis antaŭ ol estis decido pri tiu ĉi bulteno.

Tiamaniere la grupo povas fariĝi ne nur grupo de gesamideanoj, sed ankaŭ de geamikoj, preskaŭ familio.

Fine, ĉar estas necese ke la estraro sciu kio okazas en la grupoj, bonvolu tre regule informi ĝin pri ia ajn grupa aktivaĵo. Nur je tiu kondiĉo ni mem kapablos doni konsilojn se ili montriĝus necesaj. Ne devas esti kiel la UEA-delegita reto, pri kiu ni grandparte ne scias kiel ĝi funkcias en praktiko kaj kiu jam kaŭzis ne malmultajn seniluziiĝojn. Bonvolu konsideri tiun-ci artikolo kiel enkondukon kaj inviton al espereble signifoplena kultura agado. Tial ankaŭ ni atendas viajn sugestojn, admonojn, konsilojn, kritikojn.

Fernand Roose - estrarano pri kultu...

---

Pri la Universala Kongreso de Esperanto 1982

Alvoko.

Tiu ĉi jaro estas tre oportuna por klopodi konvinki la lokajn aŭ regionajn turismajn servojn eldoni esperantilingvajn faldfoliojn aŭ broŝurojn.

En 1982 okazos ja la 67-a Universala Kongreso de Esperanto de la 24-a ĝis la 31-a de julio kun prognozita partoprenantaro de 2000 personoj el kvindeko da landoj. Ĝia alta protektanto estas la reĝo.

La LKK mem jam interrilatas kun la landa turisma servo (nederlandlingva regiono) kaj kun la provinca kaj turisma servoj de Antverpeno.

En la sama jaro okazos ankaŭ la 38-a Internacia Junulara Kongreso en Loveno de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto kun prognozita partoprenantaro de 500 personoj.

Vi emfazu ke, kontraŭe al aliaj kongresoj de specialistoj, la Esperant... kongresojn ĉeestas personoj el ĉiuj tavoloj de la socio kaj ke multaj estas turisme interesitaj. Vi ankaŭ ne forgesu mencii la turisman flankon de la posta raportado, kiu do multe pligrandigas la efikon de la esperantlingvaj faldfolioj.

Eble jam ekzistas tiaj informiloj. Bonvolu tiam averti la LKK pri ĝia ekzisto kaj ne forgesu mencii la adreson de la servo por ebligi nin kontakti ĝin por akiri la necesan kvanton da informmaterialo.

Anticipe dankas pro via kunlaboro,

Nome de LKK,
Roger De Schepper
sekretario



Kelkaj konsideroj

por malfermi la dialogo(j)n.

---

Ĉu FEL iru novan vojon ?

Antaŭ ne-longe mi havis la ŝancon iom diskuti kun malnova Esperantisto pri la movado antaŭmilita, kiam estis en Flandrio 80-o da kernoj/grupoj. Vi memoras, ke antaŭ du jaroj, ĉe la (re)fondiĝo de la Flandra Esperanto-Ligo, ekzistis 11 kernoj en Flandrio.

Kiel tiom da kernoj povis malaperi sen ia postsigno ?

Mia kundiskutanto klarigis, ke la kaŭzo troviĝis en la movado mem. Tiam, ĉefe en la tridekaj jaroj, furoris la rekta Ĉe-metodo. Kursoj okazis multloke kaj diversaj grupoj fondiĝis. Tamen oni tiam sin limigis al la instruado de la lingvo.

Lokoj kie estis aktiva konvinkito ekestis Esperanto-grupo,kiu daŭris tiel longe kiel restis tiu persono. Alivorte, la Esperanto-societoj "staris kaj falis" kun tiuj personoj.

Pripensante nian tiaman interparoladeton, mi rekonas fakte nian nunan situacion. Kiom ofte ankaŭ ni nun ne faras same? Nur instrui la lingvon kaj en realeco forpeli la homojn pro malinteresiĝo aŭ eble pro malkompetenteco?

Ĉu do ni ne urĝe trovu alian vojon, alian alfronton de la problemo de la daŭra alflu(et)o de novaj lernantoj kaj forfluo de malinteresiĝintaj lernint...

Kiel eblas ke nia ĝenerala membronombro ne aŭ apenaŭ kreskas ? (Ni ne prenu tro serioze la ĉiujare en la jarraporto menciitajn membro-kreskojn: ili havas alian celon !). Kaj kiuj kulpas ?

Ni !

Ni jes klopodas konvinki la oficialajn instancojn, ni jes ofte pasigas nian tempon studante kiel eble plej detale lingvajn subtilecojn, sed ni ne sufiĉ... pensas pri niaj novaj adeptoj; pri la bazo. Ni tre facilanime perdas tiujn personojn kiujn ni antaŭe tiel pene konvinkis al lernado de la lingvo kaj konsolas nin mem per asertoj kiel : "La homoj estas malbonvolaj" aŭ "La junuloj ne aktivadas"...

Ĉu en realo ni ne estas vidante blindaj ?

Ploriga situacio, ĉu ne ?

Tamen solvo estas, devas esti ! Ni devas trovi ĝin, nepre !

Se vi havis la kuraĝon legi la bultenon ĝis ĉi tie, vi eble ankaŭ kuraĝos ion pripensi la aferon kaj doni vian opinion.
Ek do, amikoj kadromembroj! Kune ni devas trovi la bonan manieron por alfronti la ĝeneralan malaktivecon, por veki dorm(et)antajn talentojn.

Jen eble kelkaj ideoj de eminentaj Esperantistoj; saĝaj vortoj de kiuj ni kiel eble plej bone profitu.

H. MOOLER

Je kio utilas viaj kursoj, se viaj lernantoj poste disperdiĝas ien ajn? Vi instruu ne nur la gramatikon, vi instruu ankaŭ la uzon de la lingvo.

Edmond PRIVAT.

Ne neante la gravecon de pure lingvaj demandoj, ni gardu nin doni al ili troan atenton. La popolo Esperantista ne okupu sin pri lingvaj subtilaĵoj, (ĝi) fidele parolu la Zamenhofan lingvon kaj dediĉu sian tutan favoron, ĉiujn siajn fortojn al la interna ideo de l'Esperantismo por ke pro la rimedo ne estu forgesata la celo : ĉiupopola solidareco kaj tutmonda paco.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (18.2.3. p.570)

Klopodi instrui Esperanton en medio ne formita kaj sen antaŭpreparoj, tre verŝajne ne donos rezulton; lerna-do de Esperanto kiel celo el si mem, sen eblecoj de praktikaj aplikoj, apenaŭ havas sencon; praktikaj aplikoj de la lingvo estas maleblaj se ne estas personoj kiuj scias ĝin; nur la kunligiteco de tiujtri elementoj - informado/lernando/aplikado - garantias realan kaj daŭran progreson.

Edward SYMOENS (jarĉefkunveno 1981)

... nia movado verŝajne ne sufiĉe sekvas la evoluon de la socio, ne sufiĉe sentas la ŝanĝiĝantajn viv- kaj pensmanierojn ...
Ni ne mense maljuniĝu, sed reagu racie kaj objektive !

Jen kelkaj eldiroj kiuj, ŝajnas al mi, iomete ilustras niajn mankojn, kiuj fakte metas "la fingron sur la malferma vundo".
Ni kuraĉu tiun ĉi ! Sed kiel ?

Kion pensas vi ?

J.B.